

## & La avarulo:

< Rekante 32 el 65 batoj por strofo, entute 390 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2016) per modifitaj melodio de skandinava dancludo kaj ĝia rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<1,8:> (/so sola sola soso sofa mi mi;mi fa fami re remi so solfa mi mi;mi so la so la soso sofa mi mi;mi fa fa fafa rere TiTi re e do h

(#Rekantaĵe: so sola so la soso sofa mi i; fafa fami re e soso sofa mi i; so sola so la soso sofa mi mi; fa fafa re Ti re e do h

)×6 )+

### (&Strofoj:

'1 /Ĉiun havaĵon vendis avarulo, ; la tutan por ĝi ricevita2n monon ; li ŝanĝis je grandega ora bulo, ; kaj ĝin enfosis sub la bastionon.

(×:; **Tiel ni iras ĉirkaŭ juniper', ; ĉirkaŭ juniper', ĉirkaŭ juniper'.** ; **Tiel ni iras ĉirkaŭ juniper', ; dum ĉiu frumateno.)**

'2 (Poste konstante tien li reiris, ; la oron li rigardis kaj admiris. ;)× .....

'3 Sed homoj faris en ĉi lok' laboron, ; la pilgrimado sen rimark' ne restis, ; unu konjektis ion, kaj la oron ; forŝtelis, dum la avarul' forestis. ....

'4 (Revenis li, ne trovis sian karon, ; lamentis, veis, ŝiris la hararon. ;)× .....

'5 Demandis iu, kial la turmento, ; kaj sciiĝinte diris ĉi admonon: ; “Neniel tristu, ĉesu la lamento, ; jen prenu kaj enfosu do ĉi ŝtonon, ....

'6 (rigardu kiel tiun oro-pecon. ; Ĝi ne pli havis por vi utilecon.” ;)× .....